

Neergaard klarigas la financan situacion (oni ankoraŭ ŝuldas al la presisto, sed aliflanke kuŝas la mono en orientaj landoj). Li petas la mendontojn mendi kaj pagi rekte ĉe KO-KO (por ŝpari la rabaton).

T. Hoda kowski (Pollando): La libro estas tre valora, sed la artikoloj devas esti pli aktualaj. Estonte estas plej bone aperigi ĝin en du branĉaj partoj. Estas bone kunlabori kun Akademio de Esperanto.

Prof. Sirk (Aŭstrujo) rekomendas aĉetigi la libron por sciencaj bibliotekoj kaj tiel ebligi baldaŭan aperon de la dua volumo.

A. Blid (Svedujo) demandas ĉu ne estas pli bone pliampleksigi *Sciencan Revuon* ol pensi al la dua volumo. Neergaard respondas ke SR estas por ĝeneralaĵoj, ne por originalaj esploroj.

Prof. Popoviĉ (Jugoslavio) transdonas la rimarkon de d-ro Roelofs (Nederlando) ke la dua volumo estu sen lingvaj makul(et)oj. Neergaard respondis ke oni ne povis eviti tion nun, ĉar la manuskriptoj estis ofte tre malbonaj de la lingva vidpunkto.

Post tio kelkaj ĉeestantoj diskutis ĉu oni uzu neologismojn, aŭ preferu oni utiligu la ekzistantajn vortojn kun pliaj sencoj, kiun diskuton la prezidinto finis per la konkludo ke oni devas serĉi plej bonan solvon — kaj en unu kaj en alia direkto.

B. Popoviĉ (p.m.)

025.45 : 408.92

025.45 : 412

## KELKAJ KOREKTOJ KAJ RIMARKOJ PRI LA

### INDEKSO

publikigita en la antaŭa numero sur pp. 75—80.

p. 75/-3, anstataŭ: „do”, legu: „tamen”.

p. 77/-19, anstataŭ: 82/89 **Literaturo alilingva**, legu: 81 **Literaturo Esperanta (originala)**.

p. 78, interŝanĝu la tekstojn post *E* : 025.45 kaj *E* : 027(079.5).

p. 78/-6, forstreku la linion *E* 05NP.

p. 79/4, anstataŭ: *E* 093.0 : 063, legu: *E* 093 = 0 : 063.

p. 79/-3, legu: *E* 282.1 scienca : popola lingvo 6 42; 7 51, 53.

p. 80, fine de la listo aldonu:

#### L Gazetoj Literaturaj

*L* 48 NP Norda Prismo 8 100.

p. 80/-12, D-ro Wüster rekomendis tamen plu uzi por Sc. R. la indicon 001(05) = 089.2(100). Tiel estu.

408.92

*E* 3-14

## VORTOJ EL LA FUNDAMENTO DE ESPERANTO

ekster la alfabetvico de la Universala Vortaro

### Postnotoj

La samtitola artikolo (Sc. R. 11, 71-74.) kaŭzis relative abundan korespondadon.

Oni riproĉis al mi, ke la referencoj de la vortoj de la Antaŭparolo (signitaj per simpla A) ne estas sufiĉe precizaj. Kompletige jen do la referencoj laŭ la paĝoj de la 8-a eldono. Tie la Antaŭparolo ampleksas la paĝojn V ĝis XI. Simplige, mi notas per arabaj ciferoj:

absolut'	A5,9	dokument'	A8	oficial'	A5,7,8,10,11
adres'	A9	energi'	A6	paradoks'	A9
angl'	A7	Esperant'	A5,6,7	paralel'	A10
arĥaism'	A10	ide'	A11	princip'	A6,10
aŭtor'	A6,7	instituci'	A7,10,11	sankci'	A11
aŭtoritat'	A5,7,9,10,11	kompetent'	A8	special'	A5
Bulonj'	A9	kongres'	A9,11	tekst'	A8
centr'	A10,11	kontrol'	A8,9	valor'	A10
dogm'	A8	literatur'	A9	Varsovi'	A11

D-ro Ing. Wüster afable sendis al mi ekzempleron de sia verko: „*La Oficiala Radikaro*”, Berlin kaj Dresden, 1923; 70 paĝoj 10,5 × 16; kaj ĝia „*Suplemento*” (4 p., 1932). Tiu libro kaj ankaŭ ties suplemento entenas la vortojn kiuj estas la temo de mia artikolo. Ili tie estas markitaj per la signo f'.

Nu, mi devas konfesi, ke rilate al Wüster mankas en mia listo la du vortoj *krestomati'* kaj *muzik'*.

Mi ne povis trovi *krestomati'* (apartenanta al unua parto de la Dua O. A. kaj do signenda en mia listo per: 2a) malgraŭ nova traserĉo de la Fundamento. Povas esti, ke tiu vorto iel elfalis el mia eldono, en kiu ja mankas ekz-e *sanilo* en la 42-a Ekzerco (vidu Sc.R. 1959, p. 74: „la ĝusta teksto de la Ekzercaro”) kaj ankaŭ *leĝo* (ekzakte: Lé-ĝo.) en la 2-a Ekzerco kaj inter la du vortoj *paĝo* kaj *ĝis*.

Aliparte mi ne povis trovi la vorton *krestomati'* ankaŭ en la du eldonoj greka kaj itala de 1907, kiujn mi posedas, krom en reklama teksto pri la „Fundamenta Krestomatio”. Tiu teksto, sama en ambaŭ eldonoj, kuŝas tuj ĉefine de la Ekzercaro kaj antaŭ la Universala Vortaro.

Al mia listo, oni aldonu la ellasitaĵon:

1\* **muzik'** K(not)

Mi korektu tri preserarojn\*:

ĉe	diplomati'	oni legu	EL32	(anst. E32)
ĉe	Stefan'	oni legu	7b	(anst. 1b)
ĉe	Vaŝington	oni forigu la apostrofon: senfinaĵa duon-		

asimilita nomo de ŝtatestro: „Georgo Vaŝington estis naskita ...”

Mia listo entenas 111 radikojn el la Fundamento, se oni ekskludas la vortparton *nen-* kaj inkludas la forgesitan *muzik'*. Kun *krestomati'* la sumo estus 112.

Tiuj du vortoj devas esti aldonitaj al la listo de forgesitaj radikoj, kiujn la Akademio devos konsideri.

Mi profitas la okazon danki S-ron M. C. Butler, kiu ĉiam afable pretis prunte sendi al mi diversajn petitajn dokumentojn el la Biblioteko de Brita Esperanto-Asocio. Konsulto-biblioteko estas nepre bezonata kaj subtenenda institucio por nia movado.

Andreo Albault.

## MISKOREKTO DE LA FUNDAMENTO

408.92  
E 3-5 : E 82 E  
E 519.42

Sur p. 74 de la antaŭa numero de *Scienca Revuo* S-ro Albault rimarkas, ke en la originala teksto de *Ekzercaro* 36/7 (same en ĉiuj eldonoj de Fundamenta Krestomatio) staras *mia frato kaj fratino*, sed ke en la oka eldono staras *miaj*. Li diras, ke *mia* estas malbona. Fakte, tamen, *mia* estas ĝusta, kaj (kiel atestas la grasa presaĵo) la vorto *miaj* estas miskorekto farita de iu nekonata plibonigisto. En *Revuo Orienta* 1933 (pp. 29, 57, 89, 118, 145, 259, 319) aperis funda esploro pri tiu kaj similaj demandoj. Tie troviĝas 340 Zamenhofaj ekzemploj de *-a -o kaj -o*. Wm Bailey kolektis 380 (Vd. *Revuo Orienta* 1940 63). Ekzemple: *Ekzercaro* 11/2, 11/4, 35/15; *lia edzino kaj filino* (*Rev.* 69/29, 93/10, 98/26); *sia brusto kaj frunto* (*Rab.* 49/17, 133/26); *sia patro kaj patri-no* (*Sent.* 28/24). Pri *-aj -o kaj -o* troviĝas nur 10 ekzemploj, klarigeblaj per apartaj cirkonstancoj.

Verŝajne la klarigo estas, ke kvankam *miaj frato kaj fratino* estas logike defendebla, tamen *miaj frato* havas efekton ŝokan, nenaturan. Ĝi malagrabla skuas la leganton, kiu konscias nenaturan pedantan penon al logika ĝustigo. *Mia frato*, aliflanke, fluas facile kaj nature. La ideo estas: *mia frato kaj (mia) fratino*. Ĉe *Ps.* 4/7, 98/3; *Sent.* 5/11, 20/20; *Pred.* 8/6, kaj *Joel* 3/5, la Biblia Komitato aldonis la duan adjektivon; tamen Z. mem skribis *-a -o kaj -o*.

Korektante la 380 ekzemplojn de Zamenhofa *-a* per *-aj*, oni tuj sentas la mallertecon de la ŝanĝo. Leganto kiu eble kritikus la ŝajnan mankon de akordo ĉe la Zamenhofa teksto, se oni atentigus lin pri ĝi, tamen verŝajne neniam rimarkus ĝin, legante la tekston, sen tiu atentigo.

La Esperanta stilisto devas elekti inter la pedanta „logika” pluralo kaj la pli natura singularo de Z. Oni ja povas kredi, ke ĉi tie, kiel aliloke, la artista lingva instinkto de Z. estas pli sekvinda ol matematika logiko.

*Zamenhof* tamen estus skribinta *la frato kaj fratino miaj*.

M. C. Butler

408.92 : 415.4 : 42/48

E 223.1 : E 3-13(VII) + E 211.919.2 + E 233.4 + E 3-12 = 2

## ANKORAŬ PRI LA ESPERANTA RADIKARO

de D. B. GRÉGOR

La 7a Oficiala Aldono de la Akademio kaj la artikoloj de S-ro A. Albault en S. R. 11 71, 89 kiuj kune aldonas 97 komunajn vortojn al la U. V., necesigas ian ĝustigon en tiu parto de mia studo pri la fontoj de Esperanto, kiu koncernas la lingvan distribuon de la Esperantaj radikoj (S. R. 9 107). Feliĉe, la tiel okazinta kreskigo de la vort-trezoro nur konfirmas la tie eksponitajn konkludojn. Estas dezirinde tamen, ke la koncernaj ciferoj estu kiel eble plej ekzaktaj; kaj pro tio mi submetis la nove aldonitajn radikojn al analizo, kun la jena rezultato:-

El la 97, se ni esceptas tiujn vortojn, kiujn mi nomis „lokaĵ”, kaj la korelativojn, jam prenitajn en konsideron, restas 54. Estas signife, ke ĉiuj ĉi estas latinidaj, sed tiel internacie disvastigitaj, ke la plimulto el ili troviĝas ankaŭ en la germana kaj slavaj lingvoj. (Efektive, kriterio malpli rigora klasifus ilin ĉiujn sub FAGRP). La disdivido aspektas jene:-

F	1	(naiv)
FA	5	(aktiv, ĵurnal, prefiks, sufiks, valor)
FAGR	2	(pol, princip)
FARP	8	(arĥaism, dokument, instituci, kompetent, kongres, sankci, sofism, special)
FGRP	1	(kontrol)
FAGRP	37	

La novaj sumaj ciferoj do estas la jenaj: francaj 402, do latinidaj 862; FA 484, do latinid-ĝermanaj 668; FAGR 36, FARP 35, FGRP 40, FAGRP 284, do latinid-ĝerman-slavaj 554: do entute 2587; do, kun la grekaj ktp. 2652.

Ankoraŭ unu ŝanĝon mi dezirus fari en la *Fontoj*. Laŭ artikolo de D-ro D. Brozoviĉ en *Nuntempa Bulgario* de Januaro 1959, p. 10, la fonto de la sufikso *-op-*, de mi metita inter la *necertajn*, fakte devenas el la litova lingvo, kie *ketveriopas* signifas *kvaropa*.